

BONA ESPERO

Rundbrief für die Freunde, Förderer
und Mitglieder des Fördervereins
"Bona Espero" e. V.

Cirkulero por amikoj, membroj kaj subtenantoj
de Bona Espero



n-ro 32

Septembro 1991

Ktoj: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60 Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postgiro-Amt Dortmund, Blz 440 100 46 Kto-nr. 2033 99-465

Supozeble neniam plu

falos kamioneto, ŝarĝita de sako, pako kaj pasaĝeroj en riveron MULUNGU. Tio fakte okazis antaŭ kelkaj jaroj. Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, la pasaĝeroj, restis sendifektaj kaj eĉ la veturilo funkciis ankoraŭ, kiam oni estis pene malŝarĝinta kaj eltirinta ĝin. Tute kutima afero, ke ponto difektiĝas! La iam fortikaj, lignaj traboj suferas pro la ĉiutagaj postuloj kaj la pluvego dumvintra. Rivereto MULUNGU, kutime paca, malmultakva, fariĝas tiam sovaĝa torento kaj ŝiris profundan fosajon dum la daŭro de la jaroj. Tial la ponto superas kanjonon, kelkloke tri metrojn profundan. En raportoj el BE ni ĉiam denove legis pri riparoj, eĉ novkonstruoj. Hodiaŭ vi vidu la LASTAN ekzempleron, el fer-betono, espereble rezista dum jardekoj, okaze nur plilarĝigenda, kiam unu ŝpura ne plu sufiĉos.

Wahrscheinlich nie wieder

wird ein Bulli, beladen mit Sack, Pack und Passagieren in den Fluß MULUNGU stürzen. Das ist tatsächlich vor einigen Jahren passiert. Ursula und Giuseppe Grattapaglia, die Passagiere, blieben heil und auch das Fahrzeug funktionierte noch, nachdem man es mühevoll entleert und herausgezogen hatte. Eine ganz normale Sache, daß eine Brücke bricht! Die einst soliden, hölzernen Stämme leiden unter den täglichen Belastungen und den winterlichen Regengüssen. Das Flößchen MULUNGU, in normalen Zeiten friedlich, mit wenig Wasser, wird dann ein reißender Strom und hat im Laufe der Jahre einen tiefen Graben gerissen. Darum überquert die Brücke einen Cañon, stellenweise drei Meter tief. In Berichten aus BE lesen wir immer wieder von Reperaturen, sogar Erneuerungen. Heute können Sie das LETZTE Bauwerk sehen; aus Eisenbeton wird es hoffentlich Jahrzehnte überdauern. Vielleicht muß man es nur irgendwann verbreitern, wenn es einspurig nicht mehr reicht.





Kiel muso al elefanto aŭ pli konvene
lumbriko al anakondo

kontrastas la ponto super la 'Rio S. Francisco', kie pozas Ursula kun Maria, Rozamira, Jilza, Sidarta, Adarci kaj Josefina. Ili veturis pli ol 3.000 kilometrojn por ĉeesti la brazilan Esperanto-Kongreson en Vitoria, ĉefurbo de ŝtato Espírito Santo, borde de Atlantiko, norde de Rio de Janeiro. Jen raportis Giuseppe:

"Minimume alia deko da infanoj, kiuj jam regas Esperanton, sopiris partopreni tiun aventuron, sed la spaco de nia VW-buseto estas fizike limigita. Giuseppe stiris kaj Ursula kunordigis la logistikajn servojn, kiuj ja estis aparte komplikaj. Oni devis kunporti preskaŭ ĉion, de litkovriloj al pano kaj bananoj, por garanti nian pretervivadon dum la vojaĝo elspezante minimumajn monrimedojn.

Foririnte el Bona Espero la 12an de julio, ni tranoktis unue en Brasilia kaj la postan tagon ni veturis suden al Ouro Preto, la plej histori-riĉa urbo en Brazilo. Vizito de tiu urbo estis neforgeseble interesa por niaj geknaboj. La 14an de julio oni atingis la maron, unuafoja sperto por la plimulto de niaj kunvojaĝantoj. Ĝis la 19a de julio ni restadis en Vitoria kaj ĉiuj ĝuis la etoson de la kongreso.

Wie die Maus zum Elefanten oder besser
der Wurm zur Anaconda

sieht die Brücke über den Rio S. Francisco aus, auf der Ursula und Maria, Rozamira, Jilza, Sidarta, Adarci und Josefina posieren. Sie sind mehr als 3.000 km gefahren, um am brasilianischen Esperanto-Kongreß in Vitoria teilzunehmen. Vitoria ist die Hauptstadt von Espírito Santo, ein Bundesstaat am Atlantik, nördlich von Rio de Janeiro. So berichtet Giuseppe:

"Wenigstens 10 andere Kinder, die schon Esperanto sprechen, wären gerne mitgefahren, aber der Platz in unserem VW-Bus ist ja räumlich begrenzt.

Giuseppe saß am Steuer und Ursula war für die Logistik zuständig, die ja besonders schwierig war. Man mußte nämlich fast alles mitnehmen, vom Bettzeug über Brot bis zu Bananen, um unser Überleben während der Reise zu garantieren und möglichst wenig Geld auszugeben.

Nachdem wir am 12. Juli in BE abgefahren waren, haben wir zuerst in Brasilia übernachtet um dann in den Süden, nach Ouro Preto zu fahren, die geschichtlich älteste brasilianische Stadt. Der Besuch dieser Stadt war unvergeßlich interessant für unsere Jugendlichen. Am 14. Juli haben wir dann das Meer erreicht, für viele von uns das erste Mal. Bis zum 19. Juli sind wir in Vitoria geblieben und alle haben die Kongreßatmosphäre genossen.

La 21an de julio la karavano revenis al BE. La banansako estis malplena, sed ĉies koro plena de neforviŝeblaj memoroj."

Finance ebligis tiun vojaĝon fondaĵo FAME, kiu subtenas ĉijare la Esperanto-laboron en BE per 2.000,-gm Lingve akcelis ĝin instruistino Tereza Kapista el Jugoslavio, kiu restadis kelkajn semajnojn en BE. Etuloj, kiuj nur de mallonga tempo vivas ĉe ni, klopodis interkompreniĝi kun Tereza per la Internacia Lingvo. Ŝi gvidis konversacian rondon ĉefe por la kandidatoj de la vojaĝo al Vitoria.

Duoble pli granda estos baldaŭ la lernejo. Tri novajn lernoĉambrojn ni aldonis, kovritan areon por lavejoj kaj necesejoj ekzistas. En aparta ejo ni nun povas disdoni la duan matenmanĝon.

Ke homo ne nur vivas de pano, validas ankaŭ por la loĝantoj en BE. Ĉirkaŭ dekjar-aĝaj ilia ĉefa intereso estas ludi. Feliĉe en la domoj ekzistas sufiĉe da ludiloj, donace ricevitaj, sed ekstere ni nur havas pilkojn kaj kelkajn svingilojn. Memkonstruado de ludilejo restis ĝis nun revo, sed en Brasilia ekzistas ebleco akiri bonajn karuselon, balancilon, glitilon ktp. Se vi konsentas, ni klopodos havigi kelkajn kun lerneja rabato!

Kaj krome? Feliĉe nenio ekscitiga okazis dum la lastaj monatoj. Ĉiutage enviciĝas kvinfoje 40 infanoj por manĝi. Kelkajn kaptis gripo, ĉiuj, aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiuj, lernis diligente. La ekzamenoj en Alto Paraiso, por tiuj, kiuj celas diplomon de la 8a klaso, estis sukcesaj. Kune kun s-ano Sirio Silva zorgis Adarci, Maria, Juscileno, Josimar kaj Valdemar por la bezonoj en BE dum la foresto de Ursula kaj Giuseppe en Eŭropo. Ambaŭ intertempe revenis. Ankaŭ ili estis plenaj da novaj impresoj, renkontiĝis dum sia restado kun multaj amikoj de BE kaj rakontis tiujn novaĵojn dum la itala kongreso en Torino.

Tie ni ankaŭ interkonsentis inviti amikojn kaj subtenantojn al la ĉijara kunveno kun estrar-elektoj. Ni decidis pri la 7a de nov. 91, je la 18.00 h, ke vi havu okazon aŭskulti kaj vidi ILUSTRITAN RAPORTON PRI VOJAGO AL BRAZILIO, de J. Proškovec je la 19.30 h en la sama ejo.

Am 21. war die Karawane dann wieder in BE. Der Bananensack war leer, aber alle Herzen waren voll von unvergeßlichen Eindrücken.

Finanziert wurde diese Reise von der FAME-Stiftung, die in diesem Jahr die Esperanto-Arbeit in BE mit 2.000,-DM unterstützt. Das Sprachniveau war der der Lehrerin Tereza Kapista aus Jugoslawien zu danken, die einige Wochen in BE war. Selbst die Kleinen, die erst seit kurzem bei uns sind, versuchten sich mit Tereza in der internationalen Sprache zu verständigen. Ein Konversationskreis fand speziell für die Reisenden nach Vitoria statt.

Doppelt so groß wird bald die Schule sein. Drei zusätzliche, neue Schulklassen und eine gedeckte Fläche für Waschrinnen und Toiletten gibt es jetzt. In einem Extra-Raum können wir das 2. Frühstück ausgeben.

Daß der Mensch nicht nur von Brot lebt,

gilt auch für die Bewohner in BE. Im Durchschnitt unter 10 Jahre alt, ist ihr Hauptinteresse zu spielen. Glücklicherweise gibt es im Haus eine Menge Spielzeug, das uns geschenkt worden ist, aber draußen haben wir nur einige Bälle und Schaukeln. Bis jetzt blieb es ein Traum, einen Spielplatz selbst zu bauen, aber in Brasilia gibt es gute Wippen, Karuselle, Rutschen usw. Wenn Ihr zustimmt, würden wir gerne einige davon mit Schulrabatt kaufen!

Und außerdem? Es hat sich glücklicherweise nichts Aufregendes in den letzten Monaten ereignet. Fünfmal täglich stellen sich 40 Kinder auf, um ihr Essen zu empfangen. Einige hatten die Grippe, alle, oder fast alle, lernen fleißig. Zusammen mit Sirio Silva sorgten Adarci, Maria, Juscileno, Josimar und Valdemar für die Bedürfnisse in BE, als Ursula und Giuseppe in Europa waren. Beide sind inzwischen wieder zu Hause. Auch sie waren voll neuer Eindrücke, haben während ihres Aufenthaltes hier viele Freunde von BE getroffen und Neuigkeiten beim italienischen Kongreß in Turin erzählt. Dabei haben wir beschlossen, Freunde und Mitglieder am 7. Nov. 91 um 18.00 zur diesjährigen Hauptversammlung mit Wahlen einzuladen. Anschließend ist dann Gelegenheit einen ILLUSTRIRTEN BERICHT ÜBER EINE REISE NACH BRASILIEN zu sehen, den J. Proškovec um 19.30 Uhr im gleichen Raum hält.

Förderverein "BONA ESPERO" e. V.

Gegründet am 24.03.1981

Eingetragen unter Gem V 1028 - Finanzamt Münster-Stadt

Liebe Mitglieder und Freunde!

Telgte, 7.9.1991

Am 7. Nov. 1991 findet um 18.00 Uhr im BSW-Kultur-Raum, Gleis 21

Hauptbahnhof Münster (Westf)

die diesjährige Jahreshauptversammlung mit Neuwahl des Vorstandes statt.

Als Tagesordnung schlagen wir vor:

1. Eröffnung und Beschlußfassung über die Tagesordnung
2. Wahl eines Versammlungsleiters für die TOP 3 - 7
3. Geschäftsberichte
 - a) der Vorsitzenden
 - b) der KassiererIn
 - c) der Kassenprüfer
4. Entlastung des Vorstandes
5. Wahl einer Mandatsprüfungs- und Zählkommission
6. Wahlen zum Vorstand
 - a) Vorsitzender
 - b) stellv. Vorsitzender
 - c) Schriftführer
 - d) Kassierer
7. Wahl der 2 Kassenprüfer

Stimmberechtigt sind Mitglieder, die schriftlich ihre Mitgliedschaft erklärt haben. (Beitrag bis 31. 10. 91)

Vorführung einer Video-Kassette über Bona Espero und um 19.30 Uhr Bericht und Lichtbilder-Vortrag über eine Reise nach Recife im Nord-Osten von Brasilien von J. Proškovec

.....

Karaj membroj kaj amikoj!

Ni kore invitas pro la ĉi-jara jarĉefkunveno kun novelekto de la estraro, la 7. de nov. 1991 je la 18.00 h. en BSW-Kultur-Raum, Gleis 21 la ĉiusemajna kunvenejo de la Esperanto-grupo Münster en la ĉefstac

Ni proponas jenan tagordon

1. Saluto kaj decido pri tagordo
2. Elekto de kunsid-estro por la tagordaj punktoj 3 - 7
3. Raportoj
 - a) de la prezidantino
 - b) de la kasistino
 - c) de la kaskontrolistoj
4. Senŝarĝigo de la estraro
5. Elekto de nombrad- kaj mandat-komisiono
6. Elekto de la estrao
 - a) prezidanto
 - b) vicprezidanto
 - c) sekretario
 - d) kasisto
7. Elekto de 2 kaskontrolistoj

Voĉdonrajtaj estas ĉiuj, kiuj deklaris sian membrecon skribe (kotizo ĝis la 31. 10. 1991)

Ni montros VIDEO-kasedon pri Bona Espero kaj ek de la 19.30 h.

J. Proškovec raportos illustrite pri vojaĝo al Recife en nord-orienta Brazilo

Margot Brandenberg